
法事のころ

La Spirito de Budhoservo

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

ほとんどの日本人は「法事」に参列した経験があることでしょう。

この「法事」、エスペラントで何と云えばいいのでしょうか？ 宮本政男の『日本語エスペラント辞典』には "funebrado" とありますが、これは「死に起因する哀しみの感情を抱き、また外部に示したりする」という意味ですから、この語そのものは無宗教だろうが一神教だろうが、民族宗教だろうが、人間としての自然の感情を言っているだけで、仏教において大切な「法」が示されていません。これと似た語に「仏事」がありますが、宮本氏は「仏事を営む」に "servi al Budho" という訳をあてています。（"servi" とはいわゆる「サービス」ではなく、「礼拝する」という意味があります）

ここで問題にしようとしているのは、仏教用語のエスペラント訳の難しさではなく、私たち日本人が「法事」「仏事」をどのように見ているか、ということ。すなわち、法事を勤めることの深い意味合いについて、思いをいたすことが大切だと言いたいのです。私がタイトルに用いた "Budhoservo" は適訳とはいええないでしょうが、暫定的に使わせていただきます。

さて、「法事をする目的は何ですか？」と尋ねると、ほとんどの方は「死んだ親・家族の供養」とお答えになります。

Preskaŭ ĉiuj japanoj certe havas la sperton ĉeesti "hooĵi".

Kiel do oni diru tiun ĉi "hooĵi" en Esperanto? Laŭ "Vortaro Japano-Esperanta" kompilita de Miyamoto Masao, oni montras la vorton "funebrado." Funebro estas malĝoja sento pro ies morto aŭ pro malfeliĉego, aŭ eksteraj signoj de tia sento. Tial tiu ĉi vorto uzeblas en senreligia, monoteisma, etnoreligia, aŭ ĉia ajn kazo, ĉar ĝia enhavo estas natura homsento; ĝi tamen tute ne havas rilaton kun dharmo esenca al budhismo. Cetere ankaŭ troviĝas la vorto "bucuĵi"; Miyamoto donas al la ekzemplo "bucuĵi ŝo itonamu" la tradukon "servi al Budho."

Ĉi tie mi ŝatus temi ne pri malfacileco de traduko de budhismaj terminoj, sed pri tio, kiel ni japanoj rigardas "hooĵi" kaj "bucuĵi." Mi ŝatus diri, ke estas grave pripensi la profundan signifon de servo al Budho. Mi uzas "Budhoservo"-n en tiu ĉi rubriko; eble ĝi ne estas tre bona traduko, sed permesu, ke mi uzu ĝin provizore.

Nu, kiam mi demandas, "Kio estas celo de Budhoservo?", preskaŭ ĉiuj respondas: "por regali mortintajn gepatrojn (familianojn)," aŭ "regali ilin per bonza sutro, por ke ilia animo ne

あるいは「早く成仏してくれるようにお経を聞かせてやる」とか「祟りがこわいので」とか「先祖に感謝するため」という答えもあります。

これらは一見するとバラバラな動機であるように見えますが、根底においては実は一つのことを言っているのです。つまり—

「人が死ねば、肉体は滅びるが靈魂はあの世に行き、この世と行き来している。その靈魂を丁寧に祀れば、生きている者たちの守護霊として利益をもたらすけれども、ぞんざいにしていると祟りをなす。だから供養を絶やさぬようにすべきだ。」

どうでしょうか。このような観念は、どの程度自覚しているかはともかく、多かれ少なかれ私たちの骨身に染みとおっているのではないのでしょうか。先祖に感謝、といっても、しょせんは恵まれた境遇にあるからこそその感謝であって、仮に親が借金を残して死んでいけば、感謝どころか怨むのではないですか。

私たち生者にとって死者とは畏れ敬うべき存在である、と言いますが、実は自分の都合のよいように死者を利用している、ということなのです。真に恐ろしいのは死者ではなくて生者なのでしょう。

問題は、私たちはそのような自らの発想を批判的・否定的にとらえるどころか、道徳的な善行為として無自覚に肯定してしまっていることです。「供養」の美名の下に、自己の欲望成就が是認されてしまいます。

restu en tiu ĉi mondo," aŭ "por eviti ilian malbenon," aŭ "por danki prapatrojn," k.t.p.

Tiuj ĉi motivoj unuavide ŝajnas tre diversaj, sed ili en sia fundamento faras unu. Tio estas:

"Kiam homo mortas, kvankam ties korpo neniĝas, ties animo iras al alia mondo, kaj ĝi de tempo al tempo revenas al tiu ĉi mondo. Se ni ĝentile preĝas la animon, ĝi kiel protektanto alportas al ni vivantoj profiton, sed se malĝentile traktas, ĝi kaŭzas plagon. Tial ni devas daŭrigi regalon sen interrompo."

Do, kiel vi opinias? Tia ideo pli-malpli penetris eĉ nian oston, kvankam ni eble ne tre klare memkonscias pri tio ĉi. Se ni dankas al niaj gepatroj, la danko eblas nur kondiĉe ke ni estu en favorata situacio; se la gepatroj mortis lasinte ŝuldon, ni neniel dankas, sed riproĉas ilin, ĉu ne?

Oni diras, ke mortintoj devas esti timindaj kaj respektindaj ekzistoj por ni vivantoj; efektive tio signifas, ke ni utiligante ilin deziras tiri profiton kaj eviti malprofiton. Vere timindaj estas ne mortintoj, sed vivantoj.

La grava problemo estas en tio, ke ni neniel rigardas nian pensmanieron supre menciitan memkritike kaj negative, sed eĉ aprobas ĝin kiel morale bonan agon sen memkonscio. Sub la bela nomo de "regalo" realigo de nia avido estas aprobata. Nur ni ne rimarkas tion aŭ ne volas rimarki tion.

まったく情けないことですが、一部の「宗教」家のうちには、私たちのそのような無自覚な感情を利用して、恐怖心あるいは欲望をあおりたてることにより、金もうけをたくらむ輩が少なくないことです。「霊の障り」「水子の祟り」「金運をもたらす守護霊」... 枚挙にいとまがありませんが、これらが大手を振っているという現実は、私たち自身がそれを許している、歓迎していること、また私たちの内奥に自覚困難な自己中心主義が巣くっていることを示しています。

それでは、法事は何の為にするのか、ということになります。

「仏も祀れば神になり、神も拝めば仏となる」という言葉があります。祀るのと拝むのと、違いはどこにあるのか、たとえば、私心（自分の利益を中心とする発想）の有る無しによります。つまり、自分の都合でお願い事をするのが祀ること（祈願）で、拝むのは私心が徹底的に打ち砕かれていくこと（礼拝）、方向が逆になります。

ここでは何も、祈願するのはエゴイズムだから止めましょう、と言っているわけではありません。そういうことをせざるを得ないのが生身の人間です。合格祈願のために、天神様にお参りすることもあるでしょう。

ただ、エゴイズムで生きている自分の姿を振り返ることが大切です。法事においては、一言隻句であれ仏語に耳を傾け、ありのままの自分を見つめ直していく機会として大切にしましょう。

Estas tre domaĝe, ke ne malmultaj religiulaĉoj, profitante nian senkonscian senton kaj ekscitante niajn timemon kaj avidemon, agadas por sia mongajno. Ekzemple, "malhelpo fare de animo", "malbeno fare de abortito", "protektanta animo, kiu alportas bonan sorton por financo", k.t.p. La fakto, ke multege da tiuj ĉi religiulaĉoj malkaŝe sin reklamas, montras, ke ni mem permesas kaj eĉ bonvenigas ilin, kaj ke en nia profundo nestas egoismo malfacile konsciebla.

Por kio, do, oni faras Budhoservon?

Iu diris, "Budho kultate estas dio; dio respektate estas budho." Kio estas la diferenco inter kulto kaj respekto? Nome, kulto estas preĝo kun egoismo aŭ pensmaniero celanta meman profiton, kaj respekto estas adoro sen egoismo. Alivorte, kulto estas pet-esprimo pro mema deziro, kaj respekto estas radikala disfaldo de egoismo. Ili do faras inversan direkton.

Mi tamen neniel intencas diri, ke ni devas ne fari kulton, ĉar ĝi estas egoisma. Vivanta homo ne povas ne fari tiamaniere. Mi povus akcepti la agon, ekzemple kulti la dion *Tenĵin* (Sugaware Mitizane, aŭ dio de studo) por peti sukceson en ekzameno.

Estas la plej grave, ke ni retrovidi nin mem vivantaj neeviteble kun egoismo. En Budhoservo ni aŭskultu sincere budhajn vortojn, eĉ unu aŭ du, kaj introspektu nian realan memon.